*E*speranto-*N*umismatika *A*socio







**Esperanta Numismatiko** 2026 **Jarkolekto 13 - Numero 3**



# *E N H A V O T A B E L O*

## de julio 2026

Titolpaĝo: ……………………………………………………….……..... 1

Enhavotabelo ……………………………………………………………….. 2

De ni por … ni! …………………………………………………….......... 3

Moneroj & medaloj ……………………………………………….... 5

*111-A UK Graz & Julia Isbrücker*

*1-a Kurado kaj Paŝado Esperanto por Paco kaj Diverseco*

*LA 14a IMEK-2003- ORADEA - RUMANIO*

*26-a IFEF-kongreso de Esperanto 1974*

Terminaro: alfabeta listo (46) …………………………………......... 11

Spikumaĵoj & suplementoj: …………………..………………..……. 13

Por spuremuloj! ……………………………………………….……….. 14

Aspektoj de numismatiko: mondvastaj iamaj monerpeziloj (2) ….……. 15

Valormarkoj & valorbiletoj: ………………………………………… 18

Historiaj aspektoj: ikonografio, memoro kaj numismatiko ……..……. 21

El la gazetaro: "Hobioj de esperantistoj" ……………………………… 25

Retpoŝto ……………………………………………………………….. 26

Anoncoj & eventoj …………………………………………..……… 37

***Honora membro: Hans Jankowski (1928-2018)***

Tajpado kaj paĝaranĝo: Vivienne Tudts
Provlegado: Jozefo Horvath
Kunlaborantaj redaktoroj: ĉu VI? Dankon!
Finredaktoro: Bert Boon

Kontakto: bert.boon@skynet.be
Retejo: http://ena.frali.bplaced.net
www.esperanto.es/biblioteko
www.kolektado.esperanto.cc

# *DE NI POR ... NI!*



Ĉu miraklo aŭ miraĝo?

Saluton karaj legantoj!

Vi certe konas en nia revuo la rubrikon "RETPOŜTO"! Tiurilate mi antaŭ ne longe ricevis mesaĝon el tropika, paradiza kontinento, leteron de nia tre fidela membro el Brazilo James Rezende Piton. Mi tuj konsciiĝis, ke li estas la unua kaj nura leganto ĝis nun, kiu deklaras, post preskaŭ 13 jarkolektoj, ke li ne konsideras tiun rubrikon kiel revuan voston por rikolti multajn paĝojn, eĉ male!

Jen lia komento: "***La fakto, ke vi reproduktas la korespondaĵojn de vi ricevitaj estas 'oro' en la mano de estontaj historiistoj, kun tiom da detaloj pri la formoj, kiel vi akiras detalojn pri la objektoj!"*** Mi scias, ke sendube aliaj legantoj samopinias, sed James estis vere la unua kiu esprimis sian konsideron pri tiuj vostaj, revuaj "alkroĉaĵoj".

Mi mense sekve trafoliumu, kun kaj por vi, la antaŭlastan numeron de la 13a jarkolekto. En la numismatika rubriko vi povos malkovri  kvar freŝajn medalojn de diversaj tipoj kaj el diversaj landoj: Aŭstrio, Brazilo, Hispanio kaj Rumanio kaj ankaŭ faritajn el diversaj materialoj!

Post la kutima rubriko kun areto da prinumismatikaj terminoj, resalutos vin en "Spikumaĵoj" tre konata kaj malgraŭ tio ankoraŭ same enigma, sufiĉe granda, arĝenta plaketo brila kaj kelkaj novaj "fratetoj", kiuj sin prezentas - laŭ la franca artisto-juvelisto mem - kiel "broĉoj, pingloj kaj pendaĵetoj", kun komuna motivo. La superba bildo montras - el tre alta, montara vidpunkto, senspirigan pejzaĝon (ĉu realan aŭ fantazian?) de impona golfeto kun marbordo kaj lumturo. Enigmaj estas jam de longe la devenaj lando aŭ regiono kaj la nomo de la artisto. Pli ol enigmaj, mi eĉ diru … fascinaj!

Espereble vin ankaŭ fascinos la aliaj rubrikoj, kun diversaj fenomenoj rilate al la temo "numismatiko", aktuala fakvorto, por kiu René de Saussure en 1908 en "Internacia Scienca Revuo" uzis neologismon, kiu nun en PIV ne plu ekzistas:" NUMOLOGIO"!

Agrablan legadon la redakcio denove deziras al vi ĉiuj!

Fonto: foteto pri Ursula von der Leyen kun verda, fona stelo, el la belga gazeto "De Morgen" (04-06-2026)

## *Letero de la estro de la firmao Pichl*

*Kara s-ro Klag,*

*Bonvolu trovi kelkajn informojn ĉi-alligitajn. Ni ĉefe fabrikas medalojn kaj monerojn, sed ankaŭ produktas kaj distribuas insignojn kaj pinglojn. Niaj ĉefaj merkatoj estas Svislando, Germanio, Aŭstrio kaj Norda Italio. Vi povas trovi nian kompanian historion ĉe https://www.pichl-medaillen.com/Unternehmen/UEber-uns/.*

*Ni pregas ĉefe medalojn el latuno (ĉirkaŭ 80 %), sed ankaŭ iom el arĝento kaj oro. Depende de la grandeco de la medalo ni pregas ĝin per 300 ĝis 1200 tunoj da premoforto. Por pregado ni bezonas taŭgan stampilon. Niaj grafikaj dezajnistoj kreas la desegnojn per komputiloj, niaj gravuristoj preparas ĉi tiujn datumojn por CNC-maŝinoj. La pregiloj estas poste gravuritaj per ĉi tiuj maŝinoj. Post la stampado ni arĝentumas, orumas aŭ bronzumas la medalojn en nia galvaniza instalaĵo kaj poste poluras, brosas aŭ patinas ilin. Nuntempe laboras ĉe ni en Tirolo 25 homoj. Se vi hazarde estas en Tirolo kaj interesiĝas, vi estas bonvena viziti nian fabrikon.*

*Kun koraj salutoj al Vieno*

*Martin Pichl*

## *M O N E R O J  &  M E D A L O J*

## Tipo A1- Esperanto – medaloj

### 111-A UK  2026 Graz & Julia Isbrücker




| | |
|---|---|
| Lando: Aŭstrio | Kvanto: 350 |
| Metalo: latuno (63% kupro/37% zinko) | Pezo: 31 g |
| Diametro: 40 mm | Medalisto: W. Klag-firmao |
| Jaro: 2026 | Diko: 3 mm |

### *Averso:*

ĉirkaŭe: perlorando

supre: ★ ESPERANTO ★

meze: “200 STELOJ 2026

meze-sube, ĉirkaŭe: “111-A UNIVERSALA KONGRESO GRAZ”
“UNU UNCO DA LATUNO - KUPRO 63 ZINKO 37”

### *Reverso:*

ĉirkaŭe: perlorando

supre: “JULIA ISBRÜCKER ESPERANTO”

meze: ambaŭflanke: steleto

sube-ambaŭflanke: KLAG ★1887 – 1971 ★ WIEN

### *Rimarko 1:*

pregita okaze de la 111-a UK en Graz-Graco kaj por honori Julia-n Isbrücker

### *Rimarko 2:*

nominalo : 200 steloj

### *Rimarko 3:*

pregejo: Firmao Pichl [piĥl], en la tirola ĉefurbo Innsbruck [insbruk]

***Fonto:*** “La Bulteneto”, n-ro 82, Esperanto-jaro 140, p.3 ktp. (Redaktoroj: Renate kaj Walter Klag)

## *Primeira Corrida e Caminhada Esperanto pela Paz e Diversidade*

## *Curitiba 03 / 06 / 2018*




*En la podia foto, de maldekstre dekstren: Tânia Paixão (2-a loko), Vicente Sales (1-a loko), Paulo Sergio Viana (3-a loko). En tiu foto videblas, ke ili, aldone, ricevis trofeeton.*







T-ĉemizo

Medalo kun rubando






## Tipo C6 – Ordenaspektaj medaloj

**1-a Kurado kaj Paŝado Esperanto por Paco kaj Diverseco**

**Curitiba 03 / 06/ 2018**







| | |
|---|---|
| Lando: Brazilo | Kvanto: ĉ. 300 |
| Substanco: zamako kun old-arĝenta tego | Pezo: ĉ. 98 g (kun rubando) |
| Diametro: ĉ 90 mm | Medalisto: *serĉata (vidu rimarkon 4)* |
| Jaro: 2018 | Diko: ĉ. 4,5mm |

### *Averso:*

fone: tuŝanta la randon de la medalo, nigra "latiso" kun centre eltranĉita (esperanta) stelo

meze: kurbigita "bendo" kun meze du ŝajne aplaŭdantaj manoj, aspektantaj samtempe kiel la flugiloj de kolombo, simbolo de paco, kiu flugas dekstren

surskriboj: I CORRIDA
e caminhada
ESPERANTO
pela Paz e Diversidade



## *Reverso:*

fone: "latiso" kun interrompita eltranĉita stelo kun aparta, suba formo kaj malakra, dekstra pinto

maldekstre: surskriboj: T: "transamérica (*100,3 FM – pop)"*

"PROCORRER (*a favor do movimento)*" 361° *ELITE (sports experience)*

## *Ekstere:*

ekster la rando, supre: horizontala "ponteto" aŭ "okuleto" por rubando kun la vorto "REMA"

## *Rimarko 1:*

la koncerna, priskribita ekzemplero, estas posedaĵo de "Biblioteko Ary Zamora"; unu el partopren-medaloj, ricevitaj de la partoprenintoj je la alveno en Kuritibo, okaze de la "1a Kurado kaj Paŝado Esperanto por Paco kaj Diverseco". La evento okazis dum la 53a Brazila Kongreso de Esperanto (BKE) en 2018. En la kuradoj (4 aŭ 8 km) partoprenis 330 personoj, el kiuj minimume 19 estis esperantistoj. En la marŝado, pli granda nombro de samideanoj ĉeestis.

## *Rimarko 2:*

por la okazigo estis kontraktita faka firmao "Elite Eventos Esportivos". Tri sponsoroj estas menciitaj sur la rubando kaj en la reverso de la medalo: "Transamérica" (radi-stacio), "361°" kaj "Procorrer" (ambaŭ sportaj vendejoj).

## *Rimarko 3:*

"REMA", sur la "okuleto" de la medalo estas la nomo de entrepreno REMA ARTE ESPORTE, kiu fabrikis ĝin kaj sciigis, ke la medalo estis farita el la alojo "zamako", tegita (= elektrolamenita per arĝento) kaj poste submetita al iu proceduro aspektigante la medalon malbrila kaj malhela, nomata "olda arĝento".

## *Rimarko 4:*

Rafael Feijó (estro de la entrepreneto Elite Eventos Esportivos) sendis la skizojn al Ariádene Valenga. Povas esti, ke Rafael mem estis la dezajninto (li ja dezajnis kelkajn aliajn medalojn), sed ni ne havas konfirmon, ĉu la Esperanto-medalon li mem faris. Juliano Mora, iama oficisto de Elite, estis kontaktita de Miguel kaj respondis, ke li mem ne faris la medalon. Restas do tri ebloj:


- la medalisto estas Rafael Feijó;
- la medalisto estas iu nekonata oficisto de Elite Eventos Esportivos (ne plu ekzistanta);
- la medalisto estas iu nekonata oficisto de Rema Arte Esporte.

***La redakcio de ENA tutkore dankas nian membron Miguel (Miĥaelo) Bento pro la multaj penoj serĉi kaj sendi multajn gravajn informojn pri la medalo!***

## Tipo C6 – Unuflankaj Esperanto-medaloj

LA 14a IMEK – 2003 – ORADEA - RUMANIO






| | |
|---|---|
| Lando: Rumanio | Kvanto: *serĉata* |
| Substanco: argilo | Pezo: 12 g |
| Diametro: 11,6 mm | Medalisto: *serĉata* |
| Jaro: 2003 | Diko: 5 mm |

### *Averso:*

la memormedalo estas ceramikaĵo, verdkolore emajlita.

ĉirkaŭe: “La 14a IMEK - 2003-ORADEA - RUMANIO”

meze: Esperanto-stelo kun tutmeze litero E, ornamita per konstruaĵo de renversa pentogramo, kun kvin malsimetriaj kvadratetoj

sube: stiligita UMEA-signo (Universala Medicinista Esperanto-Asocio), kun fone terglobeto kaj kun la internacia  medicinista serpenteta simbolo

### *Reverso:*

Helflava argilaĵo kun JN, monogramo de la artisto

***Rimarko:*** Apotekista/farmaciista paro Budaházy István / Stefan Victor Budahazy kaj Mária en la urbo Oradea / Nagyvárad de Rumanio organizis en 2003 la 14an Internacian Medicinistan Esperanto-Kongreson (IMEK)

***La redakcio tutkore dankas d-ron Ludoviko Molnár, prezidanton de UMEA, kaj d-rinon Julinjon pro la nemalhavebla helpo, por povi verki ĉi artikolon por UMEA kaj por ENA***

## Tipo C1 – Esperanto-medalo

26ª IFEF- kongreso de Esperanto 1974







Lando: Hispanio

Kvanto: *serĉata*

Metalo: latuno/grizkolora surfaco

Pezo: 70 g

Diametro: 50 mm

Medalisto: Pujol

Jaro: 1974

Diko: 4 mm

### Averso:

meze: busto de Zamenhof, parte maldekstren. Ambaŭflanke: 1859 <  >1917

supre, duone ĉirkaŭata: "INICIATORO DE ESPERANTO (1887)"

sube duone ĉirkaŭata: "DRO. L.L. ZAMENHOF"

super la maldekstra ŝultro: "PUJOL"

### Reverso:

Gravurita surskribo: ".26ª IFEF – KONGRESO
DE ESPERANTO
MAJO 1974
TARRAGONA
(HISPANUJO)"

### Rimarko:

IFEF = Internacia Fervojista Esperanto-Federacio

Vidu ankaŭ: jk. 4, n-ro 2 p. 9

# *T E R M I N A R O*

## Alfabeta listo (46)

**klozoneo:** *speco de emajlo, en kiu la diversaj farboj estas entenataj en ĉeletoj, konsistantaj el maldikaj lamenetoj, vertikale lutitaj sur la fono*

**ĉelemajlo:** > *klozoneo*

**konto:** *komerca skriba kalkulo pri ŝuldoj aŭ havoj de aparta persono (specoj: ŝparada; infana; fremdvaluta; afera; studenta k.s.)*

**hipoteko:** *rajto, laŭ kiu nemoveblaĵo aŭ ŝipo servas kiel garantiaĵo por monŝuldoj*

**obligacio:** *valorpapero, donata kiel signo de pruntedonita monsumo, naskanta fiksan rentumon kaj repagebla laŭ antaŭfiksitaj reguloj*

**ĝiri:** *transpagi iun sumon el sia konto en la konton de iu alia*

**endosi:** > *ĝiri*

**interezo:** *kompenso, kalkulita en procentoj, kurante pagenda pro la fruktuzo de fremdaj valoroj, kies kapitalo estas ankaŭ repagenda je fiksita dato*

**kartelo:** *interkonsento de produktantoj, por forigi la liberan konkuradon kaj influi la prezojn favore al siaj interesoj, per komuna reguligo de produktado kaj vendado*

**kaŭcio:** *monsumo, kiun oni deponas, aŭ kiun oni promesas pagi, por garantii la plenumon de interkonsento aŭ farita de la kaŭcianto aŭ de alia*

**spezo:** *operacio, per kiu monsumoj estas transigataj de unu kaso al alia k.s.*

**konzerno:** *ekonomia unuiĝo de jure memstaraj entreprenoj sub unu komuna centra direkcio*

**lokaŭto:** *mastrostriko*

**obolo:** *eta mondonaco, almozo*

**oraĵisto:** *tiu, kies metio estas prilabori orajn objektojn*

**piŝtolo:** *monunuo iam en diversaj landoj*

**plafono:** *difinita limo, kiun ne rajtas superpasi kreditoj de banko, salajroj, pezoj k.s.*

**lidia statero:** *monero uzita por pagi al solduloj aŭ korteganoj*

**bildo:** *tio, kio estis frapita sur rondelo por fari moneron aŭ medalon*

**bronza putro:** *reago de kuproklorido, ankaŭ nomata bronza plago. Tio formas helan ĝis bluverdan pulvoran tavolon. La pulvero estas signalo ne ignorenda por kolektanto*








Interese estas la tabeleto kun detaloj pri la materialoj kaj la prezoj, ***dekstre sube*** surkoverte:

- el arĝent[it]a bronzo  tipo 1: 1,50 [frankoj]  tipo 2: 3,00 [frankoj]
- el kontrolita arĝento  tipo 1: 3,00 [frankoj]  tipo 2: 6,00 [frankoj]
- **el arĝento + orum. rondo  tipo 1: 4,00 [frankoj]  tipo 2: 7,00 [frankoj]**
- el oro (18 karatoj)  tipo 1: 40,00 [frankoj]  tipo 2: – [frankoj]

# *S P I K U M A Ĵ O J & S U P L E M E N T O J*






Jen pligrandigitaj bildoj de ambaŭ flankoj de unu el la diversaj "juvelsignetoj", ĉi-kaze insigno kun pinglo. La dimensioj estas nekonataj kaj do ankoraŭ serĉataj.
Tre verŝajne temas pri la tipo1 aŭ 2, menciitaj en la suba, dekstra angulo de la koverto sur la antaŭa paĝo, nome ***"el arĝento + orum.rondo".***
La diferenco(j) inter la t.n. tipo 1 kaj tipo 2 en la tabelo estu ankaŭ serĉataj. Eble nur la dimensioj diferencas…
Sur la bildoj averse de la poŝkarto mankas la pingloj. Probable oni montris nur la komunan formon de la variantoj.
La emajla plenigaĵo (steleto) sur ĉi eta insigno estas kompleta, male sur la granda ekzemplero, ĉar ĝi estis iel damaĝita.
Sur la dorsaj flankoj de la signetoj oni rimarkas, ke la manieroj de fabrikado ne estas la samaj. Por fari la grandan ekzempleron ( *ĉu nur unu farita?)* estis uzita la tiel nomata brakteato-proceso (spegula prega metodo de reverso aversen)

*Vidu ankaŭ: jk. 8, n-ro 1, p. 5 / jk. 9, n-ro 4, p.13*

# *P O R   S P U R E M U L O J !*

*En la arkivoj de ENA troviĝas diversaj fotoj, bildoj kaj referencoj al esperantaj numismatikaĵoj, pri kiuj ni scias ĝis hodiaŭ preskaŭ nenion.*

**49a enigmo**




**Kiu povas havigi al ni bildojn, dimensiojn kaj aliajn informojn pri la menciata "Hilda Dresen-medalo" el Estonio?**

**ANTAŬDANKON!**

**50a enigmo**




As Medalhas que constituem os três primeiros prêmios do concurso

**Medaloj de gimnazia konkurso en Brazilo. Kiu scias la dimensiojn kaj kromajn informojn?**

# Mondvastaj iamaj monerpeziloj (2)



Produktado en Italio ĉesis ĉirkaŭ la mezo de la 19-a jarcento. En Francio, kie Parizo fariĝis la ĉefa produktadocentro, monerpeziloj ekuziĝis ĉirkaŭ 1300. Ekde la komenco de la 15-a jarcento, produktado estis submetita al reĝaj regularoj. Ĉirkaŭ 1650 Liono aperis kiel produktadcentro kune kun Parizo, kie oni ankaŭ fabrikis pezilojn por svisaj monerpezilujoj, interalie. Komence, la rondaj bronzaj peziloj havis monerbildojn. Poste, ankaŭ tipo kun teniloj kaj la monervaloro ĉirkaŭ la rando estis fabrikata. La produktado finiĝis ĉirkaŭ 1810. En Germanio, de la 14-a ĝis la mezo de la 18-a jarcento, la produktado de monerpezilujoj okazis ĉefe en Kolonjo, kaj poste en la “Bergisches Land”. En Hamburgo kaj Emden ili estis faratаj ĉirkaŭ 1600 fare de pesilo-faristoj, kiuj fuĝis el Antverpeno. En Nurenbergo, la produktado komenciĝis komence de la 17-a jarcento. Dum la dua duono de la 18-a jarcento, monerpeziloj ankaŭ estis faritaj en Hanovro, Prusio, Ŝlesvigo-Holstinio kaj Brunsvigo. La germanaj estis farataj el bronzo, estis kvadratformaj, havis tenilojn kaj gravuritan nominalan valoron. Berlino, aliflanke, estis konata pro siaj rondaj, bronzaj specoj.



Peziloj kun teniloj estis produktataj inter 1750 kaj 1850. La plej “novaj” monerpeziloj el Germanio datiĝas de 1871 kaj estis destinataj por la novaj oraj 5- kaj 10-markaj moneroj. En Prago kaj Vieno skatoloj estis farataj post 1750, enhavantaj nur kelkajn pezilojn bazitajn sur la berlina modelo. En Aŭstrio-Hungario, rondaj nikelaj peziloj estis produktataj ankoraŭ komence de la 20-a jarcento por pesi orajn 10- kaj 20-kronajn monerojn. En Anglio, monerpeziloj por ekskluzivaj anglaj moneroj estis komence eldonataj de la Reĝa Monfarejo, sed meze de la 18-a jarcento, la anglaj monfarejoj jam ne povis kontentigi la postulon rezultigante grandan nombron da peziloj en diversaj dezajnoj, ankaŭ fabrikataj de privataj fabrikantoj post 1750. Peziloj por fremdaj moneroj, precipe hispanaj kaj portugalaj, ankaŭ estis produktataj. La lastaj oficialaj monerpeziloj por komercaj celoj de la Reĝa Monfarejo datiĝas de 1843; neoficialaj daŭre estis produktataj ĝis ĉ. 1875. En Irlando, la produktado por fremdaj oraj kaj arĝentaj moneroj komenciĝis ĉirkaŭ 1650. Post 1699, nur la maso de la koncerna monero estis indikata sur ili, sed neniu monernomo. En Pollando, ili estis uzataj por pesi nederlandajn, orajn dukatojn, eble jam en la 17-a jarcento. Krome, ni konas rondajn 19-jarcentajn monerpezilojn el Pollando por pesi rusajn orajn rublajn monerojn.




En Barato, malgrandaj serioj de ruĝaj kupraj monerpeziloj estis produktataj por rupioj inter 1790 kaj 1840.

En Nederlando, ili estis uzataj nur limigite en la 14-a jarcento, unue en Sud-Nederlando, kie la ekonomia agado estis plej granda. Komence, ili estis destinataj por oraj moneroj el ĉirkaŭaj landoj, kiuj estis popularaj tie, sed poste, ankaŭ por esti uzataj por nederlandaj imitaĵoj. Ili supozeble estis faritaj en Francio, sed ĉirkaŭ 1325, la produktado komenciĝis en Bruĝo por pesi francajn orajn monerojn, italajn orajn guldenojn, hungarajn dukatojn kaj anglajn nobelojn, same kiel por la ora leono monfarita ekde 1365 de Ludoviko de Maleo (1346-1384), Grafo de Flandrio, kaj la anĝelo monfarita sub Filipo la Brava (1384-1404), Grafo de Flandrio, per ordono de 1387, kaj la anĝelo monfarita sub Johana (1355-1406), dukino de Brabanto. Ĉirkaŭ 1450, Gento plejparte transprenis la produktadon, kiam Bruĝo vidis sian gravan ekonomian rolon, transprenitan de Gento pro la ŝlimiĝo de la Zwin. Fine de la 15-a jarcento, produktado koncentriĝis en Antverpeno, kiu evoluis en unu el la plej grandaj produktadcentroj de monerpeziloj en la mondo kaj kie pli ol 60 registritaj monerpezilproduktantoj estis aktivaj. Ĉirkaŭ 1600, ili ankaŭ estis produktataj malgrandskale en Arras. Nur post ĉirkaŭ 1750 la produktado komenciĝis en Mons, Bruselo, Loveno, Lieĝo, Meĥleno, Namuro, Sankta Nikolao kaj Aŭdenardo. Pro la blokado de Skeldo ekde 1585, ekonomia agado iom post iom ŝoviĝis norden, kie ĉirkaŭ tiu tempo pluraj fuĝantaj monerpezilfaristoj rekomencis sian produktadon en Middelburg. Kelkaj aliaj translokiĝis al Roterdamo kaj Harlemo, sed post 1600 Amsterdamo fariĝis la plej grava produktadcentro en Nederlando. Krome, monerpeziloj estas konataj el Enkhuizen, Hago, Groningen, 's-Hertogenbosch kaj Hoorn.




La monerpeziloj faritaj en Bruĝo (Belgio) ĝis ĉirkaŭ 1450 estis rektangulaj aŭ kvadrataj kaj fanditaj el bronzo. Ankaŭ nederlandaj - eble modelitaj laŭ Bruĝo - la gisitaj kvadrataj plumbaj peziloj por la franca ekuo, la flandra anĝelo kaj la angla nobelo estas ekzemploj. La origino de gisitaj, rondaj plumbaj peziloj por pesi orajn monerojn, monfaritajn inter 1340 kaj 1550, estas necerta: ili estis farataj aŭ en Flandrio aŭ en Francio. Rondaj plumbaj ekzempleroj ankaŭ estis produktataj malgrandskale en Nord- kaj Sud-Nederlando por arĝentaj moneroj el Francio kaj Nederlando - precipe por hispanaj realoj. En Gento kvadrataj latunaj blokoj, poste pintiĝantaj malsupren, estis faritaj por oraj moneroj ekde 1450; post 1500, preskaŭ ĉiuj okcidenteŭropaj monerpeziloj estis farataj tiamaniere. Nur ĉirkaŭ 1560 ili ankaŭ estis metitaj en cirkuladon por arĝentaj moneroj. Sesangulaj latunaj peziloj, kiujn uzis la angloj en la okupitaj teritorioj de Francio inter 1425 kaj 1526, estis imitataj en Antverpeno, sed nur tre malgrandskale. Arĝento estis uzata kiel kruda materialo nur laŭ speciala mendo: el Nederlando, kelkaj kvadrataj peziloj el Middelburg (M. du Mont, 1601) kaj Amsterdamo (G. Geens, 1619) estas konataj. L. van den Gheere el Amsterdamo (1582) orumis kelkajn el siaj monerpeziloj. Sur la averso de nederlandaj peziloj, ni ĝenerale trovas reprezentaĵon aŭ simbolon derivitan de la dezajnoj de la koncerna monero,





maksimume akompanata de mallongigo de la monernomo, la landnomo, la pezo de la koncerna tipo, kaj foje jaro, kiu eble respondas aŭ ne respondas al tiu de la monerdezajno (kelkfoje la jaro indikas la jaron de produktado de la bloko). Sur monerpeziloj el Sud-Nederlando kaj Middelburg, oni trovas urbajn blazonojn aŭ simbolojn derivitajn de urbaj blazonoj. En Nord-Nederlando, marko de la fabrikanto ankaŭ aperas sur la dorso, en kiu la inicialoj de la monerpesisto preskaŭ ĉiam estas enigitaj, ĉu kombine kun aliaj elementoj, kiel ekzemple urba blazono. La normaj monerpeziloj, produktitaj laŭ la monertarifo de 1499, estas maldikaj, ruĝ-kupraj diskoj kun monerbildo sur la averso kaj la tranĉnumero sur la dorso. Ĉe determinado de la maso de la monerpeziloj, oni konsideris la laŭleĝan toleremon aŭ rimedon kaj iometan eluziĝon de la tipo de pezota monero.

**Post la enkonduko de la metrika dekuma sistemo en Nederlando, la 1-an de januaro 1820, la uzo de monerpeziloj finiĝis!**











*Tiu ĉi artikolo estis verkita de Jacques Priem, iama tre aktiva membro de “Numismatica Herentals” (Belgio). La aŭtentika teksto kun bildoj aperis en la kluba revuo en 2020 sub la titolo “Muntgewichten”.*

**Tradukis Bert, ĉefe por honori sian forpasintan numismatikan kolegon Jacques Priem**

# Glumarkoj kun esperantaj valorindikoj

















SUB-POSTSIGNOJ ESPERANTO

speciale eldonitaj por la F. I. poŝtsignoj.

Tri koloroj: VERDA, RUGA, BLUA.

harmonigas kun la koloroj de la oficialaj postsignoj.

LA PLEJ ORIGINALA PROPAGANDILO



Sin turnu al S-ro W. H. CASE

(La Redaktoro "Fil. Esp.") Box 326, Manila.

















**Monbiletoj de du dolaroj** (variaĵoj)






1969: 2 blankaj nominalaj valoroj kaj du ombritaj nominalaj valoroj ĉe la averso kaj reverso.

1973: 25 jaroj de la Universala Deklaracio de Homaj Rajtoj / F.A.O.

1976: Ĉiuj nominalaj valoroj blankaj sur la averso kaj reverso.

1976: Ekskluziva serio por kolektantoj. 5000 aroj presitaj.

1977: Ekskluziva serio por kolektantoj. 7500 aroj presitaj.

1978: Ekskluziva serio por kolektantoj, memore al la 25-a datreveno de la kronado de reĝino Elizabeth II. 6250 aroj presitaj.

1982: Bank of Jamaica Act (sen presita dato)

1985: Bank of Jamaica Act (kun presita dato)

2022: Memora eldono por la 60-a datreveno de la sendependeco.

**Moneroj**










Materialo: nikelo-tegita ŝtalo
Dimensioj: 5,68 g / 23,5 mm
Rimarkoj: Royal Mint


Materialo: Kupro-tegita ŝtalo
Dimensioj: 2,40 g / 17 mm
Rimarkoj: Royal Mint

# *H I S T O R I A J   A S P E K T O J*

## Ikonografio, memoro kaj numismatiko

**La debato pri la bildo de Paul Bogle kaj ĝia mona cirkulado en Jamajko**

### 1. Enkonduko


Foto atribuita al Paul Bogle

Mono konsistigas ne nur ekonomian ilon, sed ankaŭ subtenon de politika memoro kaj nacia identeco. La elekto de historiaj personoj por aperi sur monbiletoj kaj moneroj reprezentas agon de simbola konsekro fare de la eldonanta ŝtato. En la jamajka kazo, la bildo de *Paul Bogle* (1822–1865) fariĝis grava elemento de la landa mona ikonografio.

La maltrankvileco, kiu instigis ĉi tiun studon, aperis el publikaĵo pri *Thomas L. Jennings,* vidita en socia reto. Observante la foton atribuitan al la inventinto, la tuja simileco kun la portreto de *Paul Bogle*, ĉeestanta sur jamajkaj monbiletoj kaj moneroj, vekis suspekton. La epizodo plifortigas la neceson de skeptiko antaŭ historiaj enhavoj disvastigitaj en sociaj retoj, kie bildoj ofte cirkulas sen rigora dokumenta kontrolo..

Lastatempaj historiografiaj debatoj montras eblan konfuzon inter la foto atribuita al *Bogle* kaj bildo ankaŭ asociita al *Jennings*, afro-usona inventinto rekonita kiel la unua nigra homo, kiu ricevis patenton en Usono en 1821 (*VIKIPEDIO, 2026a; 2026b*). Tia debato malkaŝas streĉojn inter historia dokumentado, cifereca cirkulado de bildoj kaj simbola firmigo antaŭenigita de ŝtata numismatiko.

### 2. Kritika analizo de la dokumentaj pruvoj pri la foto atribuita al Thomas L. Jennings

Lastatempaj analizoj ekzamenis teknikajn kaj kronologiajn aspektojn de la diskutata foto. La bildo respondas al tintipo (ferotipo), tekniko komerce disvastigita ekde 1856.

Konsiderante ke *Thomas L. Jennings* mortis en 1859, la hipotezo de la portreto estus, ke la foto estus produktita en la lastaj jaroj de lia vivo. Tamen ne ekzistas dokumentado, kiu ligas Jennings al tiu portreto, nek arkiva registro, kiu subtenas tiun identigon.

Aliflanke, jamajkaj registroj indikas, ke la foto estis en posedo de posteuloj de *Paul Bogle* kaj estis publike diskonigita fine de la 1950-aj jaroj. Kvankam tiaj pruvoj ne konsistigas absolutan pruvon pri la identeco de la portretito, ili ebligas forĵeti, kun alta grado de historiografia certeco, la atribuadon al Jennings.


La sola Billy the Kid-foto pluvivanta tintipa portreto de ĉirkaŭ 1879-80

La sistemigo de tiuj argumentoj estis prezentita en nuntempa aŭdvida analizo vaste disvastigita en cifereca platformo (*END of CONTROVERSY, 2023*), kiu plifortigas, surbaze de teknikaj kaj dokumentaj elementoj, la nevalidecon de la identigo kiel *Thomas L. Jennings*.

### 3 Paul Bogle kaj la formado de jamajka nacia memoro

*Paul Bogle* (1822–1865) estis baptista diakono kaj populara gvidanto en la brita kolonia Jamajko. Li fariĝis centra historia figuro post gvidado de la Ribelo de *Morant Bay*, movado kontraŭ sociaj malegalecoj kaj juraj maljustecoj. Ekzekutita de koloniaj aŭtoritatoj en 1865, li poste estis rekonita kiel simbolo de rezisto.

En 1969 la jamajka registaro deklaris *Bogle* Nacia Heroo, oficiale enkorpigante lin en la identecrakon de la lando. Ĉi tiu rekono pavimis la vojon por lia inkludo en ŝtatan ikonografion, inkluzive de monumentoj, poŝtmarkoj, kaj poste, cirkulanta mono.




*Plej nova familio de monbiletoj, faritaj el polimero, lanĉitaj por festi la 60 jarojn de Sendependeco. Ili prezentas la sep naciajn heroojn de Jamajko (sur la monbiletoj de 50 ĝis 1000 dolaroj), inkluzive de Paul Bogle.*

### 4. La ĉeesto de Paul Bogle en jamajka numismatiko

La firmigo de la bildo de *Bogle* okazas decide per lia enigo en la nacian monon. La Banko de Jamajko, respondeca pri la eldono de la jamajka dolaro, komencis inkluzivi la portreton de Paul Bogle en diversajn nominalojn dum la 20-a jarcento.

#### 4.1 Monbiletoj

Inter 1969 kaj 1985 estis eldonitaj ok variaĵoj de la 2-dolara jamajka monbileto kun la portreto de *Paul Bogle*, prezentante malsamajn subskribojn, sekurecajn elementojn kaj grafikan fasonadon.

En 2022 estis lanĉita la memora 50-dolara monbileto en polimero, celebrante la 60 jarojn de la sendependeco de Jamajko.

### 4.2 Moneroj

La reprezentado de *Paul Bogle* ankaŭ aperis sur la 10-centaj jamajkaj moneroj, eldonitaj inter 1991 kaj 2012. Tiuj moneroj, kun pli malalta nominala valoro, havis longdaŭran cirkuladon kaj vastan disvastiĝon, plue pligrandigante la ĉiutagan ekspozicion de la bildo de la nacia heroo.

## 5. Numismatiko kaj la legitimigo de memoro

Mono estas ŝtata ilo kvintesence, elektanta historiajn personojn por aperigi ilin sur monbiletoj kaj moneroj, la ŝtato agas kiel agento de simbola konsekro, aktive partoprenante en la konstruado de kolektiva memoro.

En tiu procezo, numismatiko ne nur reflektas historion, sed stabiligas ĝin en la socia imagaro per ĉiutaga ripetado, en komerco, salajroj kaj transakcioj, transformante la oficialan portreton en vaste akceptitan reprezenton. En la kazo de Paul Bogle, lia enigo en la jamajkan monan sistemon firmigis "oficialan vizaĝon" de la nacia heroo, eĉ se historiografiaj debatoj pri la preciza origino de la foto restas.

La debato pri la ebla konfuzo kun bildoj atribuitaj al Thomas L. Jennings montras la defiojn de la historia ikonografio en la nuntempa cifereca kunteksto, markita de la cirkulado de bildoj sen rigora kontrolo; tamen, la ĉeesto de *Bogle* sur la monbiletoj kaj moneroj de la jamajka dolaro montras kiel numismatiko superas akademiajn disputojn, funkcianta kiel mekanismo de legitimiĝo kaj simbola atestado de nacia memoro.

Rafael Augusto de Mattos Ferreira
(Membro de la Brazila Numismatika Societo
Retpoŝto: ramgu2005@gmail.com)

Bibliografio:

BANKO DE JAMAJKO. *Historio de la jamajka valuto* . Kingstono: Banko de Jamajko, sen dato. Disponebla ĉe: https://boj.org.jm . Alirita la: 14-an de februaro 2026.

MONDO DE MONBILETOJ **.** *Monbiletoj de Jamajko - Eldonoj de la Banko de Jamajko* . Disponebla ĉe: http://banknote.ws/COLLECTION/countries/AME/JAM/JAM-BOJ.htm . Alirita la: 14-an de februaro 2026.

JAMAICA GLEANER. Diskutoj pri la bildo de Paul Bogle. Kingston, 2012. Alirebla ĉe: https://jamaica-gleaner.com . Alirita la: 14-an de februaro 2026.

JAMAIKA INFORMA SERVO. *La Naciaj Herooj de Jamajko* . Kingston: JIS, sen dato. Disponebla ĉe: https://jis.gov.jm . Alirita la: 14-an de februaro 2026.

FINO DE LA KONFRONTO. Thomas L. Jennings kontraŭ Paul Bogle. YouTube, 2023. Disponebla ĉe: https://www.youtube.com/watch?v=pe5-_qif_eQ . Alirita la: 14-an de februaro 2026.

UCOIN. *Katalogo - Moneroj de Jamajko* . Disponebla ĉe: https://en.ucoin.net/catalog/?country=jamaica . Alirita je: la 14-an de februaro 2026.

VIKIPEDIO. Thomas L. Jennings. En: *Vikipedio: La Libera Enciklopedio* , 2026a. Alirebla ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Thomas_L._Jennings . Alirita la: 14-an de februaro 2026.

VIKIPEDIO. Paul Bogle. En: *Vikipedio: La Libera Enciklopedio* , 2026b. Alirebla ĉe: https://eo.wikipedia.org/wiki/Paul_Bogle . Alirita la: 14-an de februaro 2026.

***La redakcio de ENA kore dankas Rafael Augusto pro la sendo de tiu interesa artikolo!***

# *E L   L A   G A Z E T A R O*

## "HOBIOJ DE ESPERANTISTOJ"

"Pri tiu temo rakontas kaj reagis s-ro Bert Boon, iniciatinto de ENA, ĉefredaktoro de 'Esperanta Numismatiko', bert.boon@skynet.be.

*"Estimata samidean(in)o,*

*Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fak-grupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto. La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estas apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.*



*La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol ok jaroj ĝis 169 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.*

*Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!*

*Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi"). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!*

*Post aliĝo, ni klarigos, kiel vi povas (ne devas!) elŝuti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojn jare).*

*Vi krome rajtas unue peti provnumeron!*

*Kun numismataj kaj samideanaj salutoj, Bert Boon"*

***FONTO:*** https://bulteno.esperanto-usa.org/a/2024/01/pdf/

**REAGO de la ENA-REDAKCIO** koncerne la supran titolon de tiu artikolo en usona-bulteno

***"En nia fakgrupo fakte estas ankaŭ hobiistoj, kiuj nur kolektas i.a. esperantajn numismatikaĵojn. Aliflanke la plimulto de la numismatoj, kiuj ankaŭ studas la objektojn mem. La numismatiko do estas studobjekto por aŭtonoma numismatika scienco (inter niaj asociaj membroj estas eĉ muzeoj, bibliotekoj, universitatoj ktp), kaj ĝi eĉ funkcias kiel helposcienco de la historio pri la esperanta kulturo kaj interlingvistiko.***

***La du ĉefaj projektoj de nia fakgrupo, kiuj ilustras kaj klarigas la historion de niaj movado kaj komunumo, estas la baldaŭa eldono de la unuaj katalogo kaj glosaro pri esperanta numismatiko…***

*Nedevige mi volonte proponas al via asocio senpagan interŝanĝon de niaj revuoj. Tiel vi estus la unua asocia membro el Israelo kaj espereble kelkaj unuopaj gesamideanoj el via lando finfine iĝos ankaŭ individuaj membroj de ENA!*

*Danke mi aldonas numeron de nia revuo kun priskribo de belega israela medalo!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert"*

**NENIU NOVA REAGO ESTIS RICEVITA ...!**

**R E T P O Ŝ T O**

de vi por ni!

## Reagoj kaj konversacioj

*27.03.2026 11:58*

*Estimataj samideanoj,*



*hazarde mi trovis en la Reto la ĉi montratan belegan medalon en verda emajlo, sed bedaŭrinde sen klarigoj aŭ informoj (pri diametro, eldonkvanto, artisto, diko, materialo….). Eble iu el vi ĝin posedas kaj konsentos helpi min, por ke mi povu aldoni la priskribon al la aliaj jam priskribitaj UMEA- kaj IMEK- medaloj en la baldaŭ aperonta unua katalogo.*

*Mi anticipe kaj kore dankas vin!*

*Bert Boon*
*Fondinto de Esperanto-Numismatika Asocio*
*Redaktoro de "Esperanta Numismatiko"*

29.03.2026 12:57

Estimata Kreanto Bert Boon!

En la nomo de la Budapeŝta Medicina Esperanto Fakgrupo ni tutkore dankas kaj gratulas Vin pro Viaj plurdekjaraj, inventaj kaj kreaj agadoj.

Medalo, kies bildon Vi sendis, atendis Vian leteron en nia ĉambro.

Entuziasmega, per- kaj poresperanta, apotekista / farmaciista paro Budaházy István / Stefan Victor Budaházy kaj Mária en la urbo Oradea / Nagyvárad de Rumanio, organizis la 14-an Internacian Medicinan Esperanto Kongreson 2003.

La memormedalo estas helflava ceramikaĵo kun antaŭflanka, verda emajlo. Ĝia diametro estas 116 milimetroj, ĝia diko estas 5 milimetroj, la pezo estas 120 gramoj. La monogramo de la artisto estas: JN

Altestime kaj per manpremo deziras Benatajn Festojn D-ro Ludoviko Molnár kaj D-rino Julianna Farkas

Beno, Paco, Krea Komunumo, Amo kaj Sanharmonio ĉirkaŭu Ĉiujn.

D-ro Ludoviko Molnár kaj D-rino Julianna Farkas

*30.03.2026 9:28*

*Estimataj Ludoviko kaj Julianna!*

*Unuavice al vi ambaŭ kaj al viaj gekaruloj reciprokajn salutojn kaj bondezirojn rilate al la Benataj Festoj!*

*Multan dankon pro la informoj pri la belega medalo. Mi supozas, ke ĝi estis farita per argilo. Iom dubante kaj pardonpetante, mi volas peti krome sendi al mi, se eble, bildon de la reversa flanko, kie probable troviĝas la monogramo de la nekonata artisto.*

*Mi anticipe dankas vin, ĉiam preta helpi kaj servi vin kaj nian diskutgrupon.*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

30.03.2026 18:15

Karega Bert!

Tutkore ni dankas Vin pro Via fulmrapida respondo.

Ĝoje ni sendas la aldonitajn fotojn de la reversa flanko.

Plej amike salutas Vin

Ludoviko kaj Julinjo

*31.03.2026 9:56*

*Koran dankon, Ludoviko! Nun mi povas kompletigi la priskribon!*

*Mi supozas, ke ekzistas pliaj IMEK-UMEA -medaloj. Mi daŭrigos esploradi…*

*Tutkore,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*27.03.2026 11:26*

*Kara amiko!*

*Mi konscias, ke niaj kontaktoj dume iĝis tro maloftaj, sed tio ne malhelpis min pensi pri vi kaj via gravega laboro por la esenco kaj historio de Esperanto. Mi do esperas ke vi fartas tre bone, ĉefe koncerne vian sanon!*



*Eble vi jam sciis, ke ENA kaj Elf-AREK regule kunlaboras, ĉar Elda Dörfler petis min helpi per sendado de artikoloj por "La Verda Lupeo". Mi trovis en mia privata arkivo poŝtkarton kaj du glumarkojn, eldonitajn okaze de la Unua Helena Esperanta Kongreso en Ateno (1932). Eble vi povus trovi informojn pri la mezuroj de ambaŭ objektoj kaj pri la kongreso mem. Nek en Google nek per AI mi havis tiurilate sukceson, bedaŭrinde…*

*Mia dua peto koncernas la unuan "Katalogo de Esperanta Numismatiko", kiun mi volas kompletigi kaj "eldoni" en la daŭro de 2027. Por verki enkondukon ,vi estas por mi la plej taŭga kaj kompetenta samideano. Se vi akceptus, vi mem decidus pri la kvanto da paĝoj, la stilo ktp, se nur ĝi ne estu panegiro por la kompilanto, sed konciza pripenso rilate al la scienca esplorado de Esperanto kaj Esperantujo…*

*Mia peto estas evidente nenia provo "devigi" vin, male, ĉar mi scias ke via tempo estas ege grava por via propra laboro!*

*Do, mi nur petas vin unuavice pripensi mian peton… Amikoj ni certe restos!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

31.03.2026 12:40

Kara Bert Boon,

multan dankon pro via mesaĝo kaj viaj interesaj demandoj.

Mi fartas bone kaj mi esperas, ke vi same bone fartas kaj pasigas agrablan printempon!

Ni trovis informojn pri la Unua Helena Esperanta Kongreso en Ateno (1932) en la numeroj 7–10 (1932) de la periodaĵo "Lingvo Internacia", sed bedaŭrinde ni ne vidis informojn pri la mezuroj de la objektoj.

Mi tre ĝojis pri via invito verki tekston por la unua "Katalogo de Esperanta Numismatiko". En la jaro 2027 la Esperantomuzeo de la Aŭstria Nacia Biblioteko festos la 100-jaran jubileon. Pro tio kaj niaj projektoj por la festjaro, pri kiuj mi donos antaŭrigardon dum la 111-a UK en Graz, mi ne povas akcepti vian afablan inviton. Mi petas vian komprenemon.

Amikajn salutojn kaj bondezirojn el Vieno,

Mag. Bernhard Tuider (Sammlung für Plansprachen und Esperantomuseum)

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

03.04.2026 19:18

Estimata S-ro Klag,
vi estas konata kiel fakulo pri Esperanto moneroj. Pro tio mi esperas, ke vi permesas al mi peti konsilon de vi. Tamen mi kompreneble ne volas ĝeni/okupigi vin tro multe.

Pri kio temas?

Konatulino de ni (ŝi estas la filino de longtempa membro de la Darmstadta Esperantogrupo kiu forpasis antaŭ kelkaj jaroj) alparolis nin. En la postlasaĵoj de ŝia patro ŝi trovis Esperanto monerojn. Ŝi mem ne interesiĝas nek pri Esperanto nek pri moneroj. Pro tio ŝi ŝatus forvendi ilin kaj demandis nin kiamaniere ŝi plej bone povas fari tion. Bedaŭrinde ankaŭ ni ne scias tion, sed ni memoris vian nomon kaj rilaton al Esperanto moneroj.

Pro tio mi hodiaŭ skribas al vi. Ĉu vi eble povas rekomendi personon kiu profesie aĉetas kaj vendas Esperanto monerojn? Aŭ ĉu vi konas personojn kiuj private interesiĝas pri tiaj moneroj kaj eble estus interesitaj aĉeti ilin? Aŭ ĉu vi konas aliajn vojojn por vendi tiajn monerojn?

Temas pri

1 ekzemplero 25 Steloj (argento) el la jaro 1965, sub la kapo de Zamenhof legeblas la vorto PROOF

4 ekzempleroj 100 Zloty (argento) kun la kapo de Zamenhof el la jaro 1979

Pri la kvalito de la moneroj mi nenion povas diri, ĉar mi tute ne spertas pri tio. Sed mi fotis la 5 monerojn de ambaŭ flankoj (vidu la aldonitajn fotojn).

Mi estus tre dankema aŭdi de vi en ĉi-tio afero kaj jam antaŭe dankas pro via afableco ankaŭ en la nomo de nia konatulino.

Kun la plej bonaj salutoj kaj bondeziroj por la Paskaj tagoj

Susanne Warmuth

03.04.2026 19:46

Estimata sinjorino Warmuth!

Dankon pro via letero.

Tiujn monerojn mi konas kaj ili estas ofte vendataj en aŭkcioj kaj tie en MA-shops:

https://www.ma-shops.de/shops/search.php?searchstr=zamenhof&catid=6&submitBtn=Finden&days_new=

Nun vi havas impreson pri la prezoj.

Eble vi konas Bert Boon, la estro de Esperanto-Numismatika Asocio?

Lia adreso: bert.boon@skynet.be

Dum la sekvaj 15 tagoj mi ne estos hejme kaj ne povos retleteri.

Ni pludiskutu poste, ĉu bone?

Por informo mi aldonas pdf-broŝurojn pri la STELO.

Kopio al Bert, Alfred, Ewald kaj Bernhard.

Kun amikaj salutoj

Walter Klag

30.04.2026 21:02

Kara Bert!

Dankon pro la plej freŝa numero.

„Pezo: 141 g“
Gramo estas mezurunuo por la maso, ne por la pezo:

| **Karakterizaĵo** | **Maso** | **Pezo** |
|---|---|---|
| **Difino** | Kvanto de materio (atomo-nombro) | Gravita forto sur objekto |
| **Mezurunuo** | Kilogramo, gramo | Neŭtono |
| **Mezurilo** | Pesilo (komparanta masojn) | Dinamometro aŭ risorta pesilo |
| **Vektoro** | Skalara grando (nur valoro) | Vektora grando (direktita al la centro de la planedo) |

Amike salutas

Walter Klag

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

07.04.2026 13:56




Kara Bert!

Mi fartas bone. Bedaŭrinde mi ne povas trovi aspekton de la medalo "Hilda Dresen". Mi trovis nur du konfirmojn ke ĝi ekzistas, sed ĝi ne estas trovata. Mi bedaŭras, sed mi serĉos plu.

Amike,

Anatolo Sidorov

01.05.2026 4:16



Kara, Bert!

Dankon, pro la sendita vica numero de ENA. Ĝi estas riĉa je raraj esperantaĵoj. Reciproke mi sendas bildeton pri plakedo. La informo estas en gazeto "Esperanto" (UEA), 1933, N 396-397 (8-9), p.13.

Amike,

Anatolo

*02.05.2026 10:52*

*Kara Anatolo!*

*Multan dankon pro viaj afablaj rimarkoj! Specialan dankon pro la bildo de la plakedo. Mi supozas, ke vi ne posedas informojn pri la mezuroj kaj dimensioj?*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

03.05.2026 5:29

Bonan matenon, kara Bert!
Mi serĉis detalojn pri la plakedo.

Mi trovis nomojn de skulptisto kaj de firmao produktinta la plakedon.

Amike,

Anatolo.

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*07.04.2026   18:37*

*Kara Jozefo!*

*Unuavice korajn printempajn bondezirojn al vi kaj al viaj gekaruloj, malgraŭ la terura situacio en grandaj partoj de la mondo.*

*Mi denove sukcesetis finlabori novan numeron (ĉifoje kun ampleksa rubriko "Retpoŝto"). Mi ja en majo iĝos 78-jara, ne tute en vere bona sanstato, sed mia aktuala plano estas se eble kompletigi almenaŭ la 13-an jarkolekton. Poste mi decidos ĉu jes aŭ ne daŭrigi ĝis la kompletigo de la 15a jarkolekto. Kroma kaj duma tasko estos kompili la katalogon kaj la terminaron… Mi ĝis hodiaŭ persistis dank' al la helpo kaj la pacienco de mia edzino kaj mia pli matura nepo.*

*Mi denove antaŭdankas vin pro via nemalhavebla helpo kiel provleganto!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

*14.04.2026   11:19*

Kara Bert,

pardonu pro la prokrasto. Intervenis familiaj aferoj. Jen mi sendas la provlegitaĵon. Kun miaj amikaj salutoj:

Jozefo Horvath

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.04.2026   11:09

Kara Bert,

Mi esperas, ke vi kaj via edzino bone fartas.

Dankon pro plia numero! Mi legis pri eltrovaĵoj kaj unua, rapida foliumado jam donis al mi plurajn novajn sciojn pri tiu arto Numismatiko!

**La fakto, ke vi reproduktas la korespondaĵojn de vi ricevitajn estos "oro" en la mano de estontaj historiistoj, kun tiom da detaloj pri la formoj, kiel vi akiras detalojn pri la objektoj**!

Longan vivon kun sano al vi por plua esplorado!

Amike

James Rezende Piton

*05.05.2026   14:17*

*Karaj James kaj familio!*

*Kun prokrasto, pro kiu mi pardonpetas, jen mia respondo al via afabla reago koncerne nian revuon.*

*Ege plaĉas al mi, ke vi estas **la unua kaj la nura membro kiu ,en preskaŭ 13 jaroj, aprezas kaj laŭdas la decidon ekde la fondo reprodukti la korespondaĵojn en Retpoŝto**. Ekde la starto, konstatinta, ke pri numismatiko esperantista preskaŭ nenio troveblis, mi decidis donaci al Esperantujo bildon de la kunlaboro inter ENA kaj la legantaro, kiu ofte subtenas la daŭrigon de la revuo de nia fakgrupo, kunlaborante kiel neoficialaj membroj de la redakcio. **Eble, kiel vi sugestas, estontaj**, **verkos la historieton de ENA, la unua fakgrupo pri esperanta numismatiko... historiistoj pere de IEspA aŭ aliaj arkivoj***

*Multan dankon kaj tutkorajn salutojn al vi ĉiuj!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

05.05.2026   14:47

Dankon, Bert!

Mi rakontu, ke mi tuj "nazumis" en la korespondaĵo inter vi kaj juna Miĥaelo (Miguel) Bento, el suda Brazilo. Li estas brila junulo, jam kun grandaj scioj kaj senfina esploremo. Mi de jaroj korespondas kun li sed mi nur havis la okazon lin persone renkonti en Braziljo, fine de la lasta jaro, dum la Brazila Kongreso de Esperanto. Mi ĝojis ekscii, ke jam estas konstateble fruktodona kunlaboro inter vi.

Ĉion bonan!

Amike,

James

*06.05.2026   9:14*

*Saluton James!*

*Mi forgesis vian "PS". Ni, pro sanstato kaj aĝo, ne vojaĝos al Graz, sed Elda ankaŭ por ENA informos kaj propagandos surloke, laŭ ŝia propra propono. Agrablan restadon en Italio!*

*Kore,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.04.2026   14:39

Saluton!

Koran dankon pro la nova numero!

Jen kelkaj komentoj kaj demandoj:

- La vikipedia artikolo pri Benjamin Camozato estas iom lama (supozeble kulpas mi kaj James, kiuj ankoraŭ ne verkis pli bonan!). Multaj informoj mankas, kaj tro da atento estas donata al flanka afero (la dokumentfilmo pri la itala ŝipo). Cetere, en 1923 Getúlio Vargas gvidis nek la ŝtaton Suda Riogrando, nek la ribelon kiu ĉi tie okazis. Borges de Medeiros estis la diktatoreca ŝtatestro, kaj la ribelulojn gvidis Joaquim Francisco de Assis Brasil. Tamen Getúlio estis tiam subtenanto de Borges de Medeiros, kaj en 1928 li iĝis ŝtatestro de Suda Riogrando.

- Mi ĉiam skribas CamoZato, kiu ŝajnas al mi la preferinda formo (kial vi redaktis miajn mesaĝojn?). Mi ne studis la aferon tre profunde, sed mi rimarkis, ke la formo kun Z estas multe pli ofta ol tiu kun S, kaj ke la posteuloj uzas "Camozato" aŭ "Camozzato". Mi kunsendas foton de signaturo de Benjamin Camozato (el ekzemplero de "Fundamento de Esperanto", el la kolekto de Biblioteko Ary Zamora), kie klare videblas la litero "Z". Eble tamen li poste ekpreferis la formon kun "S", kiel videblas en la poŝtkarto, kiun mi ankaŭ kunsendas (el la kolekto de Instituto Egon Schaden). Tamen atentu: subskribo kun "S", presita nomo kun "Z"!


- Niaj mesaĝoj ial aperis iom ekstervice (ŝajnas, ke mi plu insistas pri la pingloj eĉ post kiam vi respondis, ke vi ne okupiĝas pri ili!)

- Ĉu en la venonta numero la medalo de la "1-a Kurado kaj Paŝado Esperanto por Paco kaj Diverseco" aperos en la rubriko "Moneroj & Medaloj"?

En la venonta monato mi sendos informojn pri plia medalo ankoraŭ ne konata de vi.








Amike,

Miĥaelo Benton

*04.05.2026   15:53*

*Kara Miguel!*

*Mi pardonpetas unuavice pro la prokrasto de mia respondo, sed hodiaŭ mi povas samtempe kunsendi tre pozitivan mesaĝon! Hodiaŭ matene post preskaŭ unu monato mi ricevis vian sendaĵon kaj povis fine admiri la belegajn "Flor"- medalojn! Multan dankon!*

*Mi devas pardonpeti ankaŭ pro la fakto, ke mi firedaktis pri la ortografio de "Camozato". Eble mi estis konfuzita per la antikva diskuto pri la nomo de Ludoviko: ĉu Samenhof aŭ Zamenhof? Mi aĉetis leteron de li kun, en la adreso "Samenhof", en la subskribo "Zamenhof"…Nu, nur detalo sen granda influo, ĉu ne?*

*Pli grava por mi estas via konstato, ke vi ne estas tute kontenta pri la iama vikipedia kontribuaĵo de vi mem kaj James. ENA havas rubrikon "Spikumaĵoj & suplementoj" por kompletigi kaj eĉ plibonigi malnovajn informojn. Mi pretas rezervi unu aŭ du paĝojn por vi por reverki por ENA alian version. Evidente nedevige!*

*La "1a Kurado…"-medalo certe aperos en la venonta numero, eble ankaŭ la "Flor"-medalo, kies dimensiojn mi nun povas konstati.*

*Mi sendube dume ege scivoleme atendas bildojn kaj informojn pri la mistera medalo "ne jam"konata al mi!!!*

*Koran dankon, Miguel.*
*Amike kaj numismate,*
*Bert*

05.05.2026   16:30

Resaluton, kara Bert!

Mi ĝojas, ke la du medaloj bonorde alvenis, finfine!

Jes, estas nur detalo, ĉu oni preferas skribi Camozato per "z", "s" aŭ "zz"! Mi grumblis nur ĉar temis pri mia propra mesaĝo!

Mi neniam okupiĝis pri la vikipedia artikolo pri Camozato. Mi celis diri, ke mi aŭ James jam devus esti verkintaj ion pli bonan, kion vi povus uzi anstataŭ tiu artikolo. Plia tasko iam farota!

Amike,

Miĥaelo

07.05.2026   20:42

Resaluton, kara Bert!

Antaŭ kelkaj semajnoj, kiam mi estis foliumanta la tutan kolekton de Brazila Esperantisto serĉe de poemoj de Francisko Valdomiro Lorenz, mi trovis informojn pri tri medaloj, kiuj ŝajne ankoraŭ ne estas konataj de vi.

En 1950 Brazila Esperanto-Ligo starigis ĉiujaran konkurson por gimnazianoj. La partoprenantoj devis verki tekston en Esperanto pri la temo de la koncerna jaro ("Historio de Esperanto", "La sendependeco de Brazilo", "La Imperiestro D. Pedro II" ktp.).

La 1-a premio estis ora medalo (D-ro Zamenhof), la 2-a arĝenta (D-ro Couto Fernandes), la 3-a bronza (D-ro Baggi de Araújo). Estis ankoraŭ tri pliaj premioj, kiuj tamen konsistis nur el libro.

Tamen, samkiel en la Belartaj Konkursoj de UEA, la ĵurio rajtis ne aljuĝi ĉiujn premiojn. Ŝajnas al mi ke tiu konkurso ne estis aparte sukcesa, kvankam ĝi okazis plurfoje: ĝis nun mi trovis nur unu aljuĝon de medalo! Paulo Amorim Cardoso ricevis la bronzan medalon en 1952.

Eble troviĝas ekzempleroj en la sidejo de Brazila Esperanto-Ligo, sed mi ne havis tempon serĉi kiam mi estis tie en la pasinta monato!

Amike,

Miĥaelo

*10.05.2026   10:18*

*Kara amiko Miĥaelo!*

*Unuavice mi denove devas ĝeni vin. Mi konstatis, ke mi forgesis peti al vi pligrandigi ankaù la tre etan surskibon averse sub la vorto ESPERANTO. Mi provis per zomado, sed la literoj restis tre nebulecaj.Permesu al mi peti denove vian helpon!*

*Tre, tre interesaj estas la tri medaloj rilate la konkurson de gimnazianoj. Ekde nun mi esploros la Reton por trovi la dimensiojn kaj aliajn informojn pri ili. La tekstoj el la revuo estas tre riĉaj je informoj pri la evento!*

*Multan dankon!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.04.2026   17:11

Dankegon pro ĝi! Kiel kutime, mi ĝin legos plezurege!

Via Elda Dörfler

02.05.2026   19:13

Kara Bert!

Mi komencis legi ENA-n, kies via enkonduko min kortuŝis. Kiaj trafaj esprimoj, kiaj kleraj citaĵoj, kia argumentado, tute klara kaj sincera kontraŭ la silento de esperantistaro! Mi klinas mian kapon antaŭ vi, estiminda iniciatoro de ENA kaj karega Amiko! Mi senpacience atendos la momenton, kiam mi povos ellegi la tutan revuon, ĉiam tre riĉan je interesegaĵoj!
Kun plezuro kaj honorsento mi pretigos la artikolon, senbildan kaj senklarigan.
Hodiaŭ mi ne sukcesos, sed morgaŭ posttagmeze mi faros. Je la 16-a horo mi havas retan rendevuon kun nia kara James. Post nia interparolado, ĉ. unu kaj duonan horon, mi tuj eklaboros kaj sendos. Tio estas rapida faro.

Filatel-amike via Elda

*19.04.2026   20:36*

*Kara Elda,*

*multan dankon pro la fotoj! Espereble vi havas hazarde ankaŭ retadreson de iu samideano el la najbareco de Pisa, ĉu? Mi evidente bezonos informojn pri ĝi kaj siaj dimensioj…*

*Mi dankas vin anticipe kaj salutas vin ambaŭ*

*varmkore,*

*Bert*

06.05.2026   11:59

Kara Bert, pardonu mian malfruan respondon al via demando, sed ne de mi forgesitan.

El Pisa mi konas nur Brunetto Casini, aldone liajn kontaktojn:

retejo - http://pisa.esperantoitalia.it/

Amike, Elda

*22.05.2026   14:48*

*Kara kundelegito S-ro Casini,*

*vian retadreson mi ricevis de mia amikino Elda Dörfler el Trieste. Elda rekomendas vin kiel samideanon kiu probable plejeble akurate povus informi min pri la dimensioj kaj aliaj elementoj koncerne la historion de la Pisa- medalo. Por klarigi kion mi bezonas por povi priskribi la medalon,*

*mi kunsendas la pli aktualan numeron de nia ENA-revuo, en kiu la rubriko "Moneroj kaj medaloj" montras kelkajn medalojn kun priskibaj ecoj.*

*Esperante, ke vi konsentas helpi min kompletigi la aron de italaj esperantaj medaloj, kiuj baldaŭ troviĝos en la unua tiurilata katalogo, mi anticipe kore dankas vin pro via nemalhavebla helpo.*

*Samideane kaj numismate,*

*Bert Boon*
*Iniciatinto de Esperanto- Numismatika Asocio (ENA)*
*Ĉefredaktoro de la ENA-revuo*
*UEA-delegito por Belgio*

23.05.2026   18:47

Bonege! Mi varme esperas, ke li kontentigos vin!

Amike, Elda

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.05.2026   19:54

Tre kara s-ro BERT BOON,

Mi elkore dankas vin pro via peza kaj inteligenta laboro por ENA-revuo.

Fakte tio estas tre respektinda laboro kaj vi sufiĉe instigas kontenton en mia menso kaj korpo ĉiutage.

ĉiuj paĝoj estas agrablaj kaj bonvenaj. Propaganda afiŝo pri la centjariĝa jubilea medalo (MEDALO DE ZAMENHOF), Aspektoj de numismatiko; mondvastaj iamaj monerpeziloj ktp estas tre interesaj. Mi estas kontenta pro via senlaca laboro. Pro tio mi gratulas vin.

Mi deziras bonan sanon al vi kaj al via tuta familio.

Kun sinceraj salutoj!

Amike,

d-ro Mukunda Pathik    (Nepalo/Usono)

*1/05/2026 12:48*

*Kara samideano!*

*Mi multe ĝojas pro via afabla reago. Jen forta instigo por daŭrigi la projekton, malgraŭ miaj 78 jaroj.*

*Mi vidas, ke vi estas doktoro. Mi petas vin - mi estas scivolema, pardonu -klarigi al mi pri kiu fako vi studis kaj laboras…antaŭdankon! Tre interese por scii!*

*Ankaŭ al vi kaj viaj gekaruloj mi deziras agrablan vivon!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

30.04.2026 21:43

Kara Bert,

dankon por la sendado de la ENA-revuo.

Kore salutas Andreas

Andreas Diemel

*01.05.2026 14:09*

*Kara Andreas!*

*Multan dankon pro via afabla reago…*

*Korajn salutojn de*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

03.005.2026 16:08

Dankon Bert

Interesa kaj bela kaj multe da legado !!!
Kore,
Liliane Ketelers La Konko Oostende (Belgio)

*03.05.2026 18:25*

*Kara Liliane!*

*Mi ege ĝojas pro via afabla reago. Krome ĝi donas al mi okazon peti vian helpon.*

*Ekde 2014 mi esperas trovi diversajn numismatikaĵojn eldonitajn de lokaj aŭ regionaj Esperanto-asocioj, kiel "La Konko". Koncernas monerojn, ĵetonojn, medalojn kaj alitipajn valormarkojn ktp. El nia revuo vi sendube scias, kio estas interesa por ENA kaj Esperantujo…*

*Mi antaŭdankas vin pro viaj eventualaj helpo kaj kunlaboro!*

*Amike kaj numismate,*
*Bert*

04.05.2026 15:18

Kara Bert
Mi bedaŭras ke mi ne povas helpi vin. Nia asocio estas tre malgranda kaj la personoj kiu povos helpi vin estas tre maljunaj kaj ne plu havas bonan cerbon.

Mi havas ankoraŭ bonan cerbon, sed mi ne memoris vidi ion eldonitan en nia klubo.

Elkore kaj amike,

Liliane

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

04.05.2026 19:25

Saluton,

Dankon pro la daŭra alsendo de la ENA-revuo, kiun mi ĉiam kun intereso legas. En numero 1 de 2026 aparte trafis min bildo sube de paĝo 10. Naskiĝinte en Bruĝo en 1962, tre interesas min la memorigaĵo pri la jubileo, en 1962, de la tiea grupo «Paco kaj Justeco». Ĉu vi povus publikigi pliajn detalojn pri tiu objekto?

Kun antaŭdanko,

André Ruysschaert

*04.05.2026 20:31*

*Saluton kara André,*

*en 2025 mi priskribis la plaketon en jk.12, n-ro 4," Moneroj & medaloj". Aldone vi trovos ĉi tie la paĝon kun la objektaj detaloj. Mi supozas, ke en la arkivo de la grupo troviĝas pliajn interesajn informojn, ankaŭ taŭgajn por ENA…!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*18.05.2026 15:12*

*Tre estimata Sinjoro Prezidanto Tonu Hirsik,*

*Kiel fondinto de nia fakgrupo (ekde 2014) mi bezonas vian helpon, do mi petas vin havigi al mi informojn. Temas pri medalo honore al Hilda Dresen. Mi trovis bildon de la koverto de monografio aŭ broŝuro, verkita de Prof. D-ro Jüri Falvet kaj eldonita en Tartu en 2005 kun titolo "Medalo Hilda Dresen". Mi supozas, ke en ĝi estas montrata kaj priskribata la honora medalo kreita de la medalisto Are Haab.*

*Do, mi celas publikigi la medalon en nia revuo kaj baldaŭ ankaŭ en la "Unua Katalogo de Esperanta Numismatiko". Ni ĝis nun ne povis prikskribi unu estonian esperantan medalon, tamen mi ie legis, ke ekzistus almenaŭ ankaŭ du medaloj koncerne festivalojn pri Kannel-muziko.*

*Esperante, ke ni tiurilate povos kunlabori, mi anticipe kaj tutkore dankas vin!*

*PS por doni al vi impreson de nia revuo, kaj precipe de la rubriko "Moneroj & medaloj", mi aldone kiel donaceto kunsendas la pli aktualan numeron.*

*Samideane kaj numismate,*

*Mag.Fil. Bert Boon*

*Fondinto de ENA*

*Ĉefredaktoro de ENA-revuo*

*Fakdelegito de UEA por Belgio*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*18.05.2026 15:12*

*Kara samideanino,*

*Kiel fondinto de nia fakgrupo (ekde 2014) mi bezonas vian helpon, do mi petas vin havigi al mi informojn. Temas pri medalo honore al Hilda Dresen. Mi trovis bildon de la koverto de monografio aŭ broŝuro, verkita de Prof. D-ro Jüri Falvet kaj eldonita en Tartu en 2005 kun titolo "Medalo Hilda Dresen". Mi supozas, ke en ĝi estas montrata kaj priskribata la honora medalo kreita de la medalisto Are Haab.*

*Do, mi celas publikigi la medalon en nia revuo kaj baldaŭ ankaŭ en la "Unua Katalogo de Esperanta Numismatiko". Ni ĝis nun ne povis prikskribi unu estonian esperantan medalon, tamen mi ie legis, ke ekzistus almenaŭ ankaŭ du medaloj koncerne festivalojn pri Kannel-muziko.*

*Esperante, ke ni tiurilate povos kunlabori, mi anticipe kaj tutkore dankas vin!*

*PS por doni al vi impreson de nia revuo, kaj precipe de la rubriko "Moneroj & medaloj", mi aldone kiel donaceto kunsendas la pli aktualan numeron.*

*Samideane kaj numismate,*

*Mag.Fil. Bert Boon*
*Fondinto de ENA*
*Ĉefredaktoro de ENA-revuo*
*Fakdelegito de UEA por Belgio*

01.06.2026 7:51

Bonan matenon!

Bedaŭrinde mi ne trovis iun ajn informon pri la medaloj.

Eble mi povos ion trovi en la estonteco. Mi memoros vian peton.

Kun bondeziroj

Lehho Jõumees

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

*20.05.2026 17:15*

*Kara amiko Bernhard!*



Malgrandigita reproduktaĵo de la plakedo.

*Kiel vi fartas aktuale kaj kion novan pri nia kulturo la Muzeo malkovris lastatempe?*

*La reala kialo de mia hodiaŭa peto estas, ke mi hazarde trovis surpaperan bildon, probable de arĝenta plakedo, honore al Ed Stettler. Bedaŭrinde mi ĝis nun ne trovis unu fonton por povi priskribi la numismatikajn elementojn, kiajn vi konas el la rubriko "Moneroj & medaloj" en la ENA-revuo.*

*Mi esperas, ke via arkivejo posedas elementojn, krome historiajn, koncerne tiun tre interesan artefakton pri tiu meritplena pioniro.*

*Evidente mi anticipe tutkore dankas vin pro viaj nemalhaveblaj peno kaj helpo tiurilate!*

*Amike kaj numismate,*

*Bert*

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

01.06.2026 7:51

Bonan matenon!

Bedaŭrinde mi ne trovis iun ajn informon pri la medaloj.

Eble ankoraŭ mi povos ion trovi en estonteco. Mi memoros vian peton.

Kun bondeziroj

Lehho Jõumees

☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆

01.06.2026 9:20

Koran dankon, kara Bert, pro la nova numero de ENA-Revuo!
Amike el Kroatio,
Velimir Piškorec

*09.06.2026 14:58*

*Mi dankas vin, kara Velimir,*
*pro viaj intereso kaj afabla reago!*
*Amike kaj numismate,*
*Bert*


☆☆☆☆☆☆☆☆☆☆


*A N O N C O J*

*&*

*E V E N T O J*






NUMISMATIKO

# Nova stelo-monero



Walter KLAG
korespondanto de MONATO en Aŭstrio




WALTER KLAG

*La nova monero de 200 steloj.*

La Esperanto-kulturo havas ne nur propran lingvon, literaturon, historion kaj muzikon, sed ankaŭ propran monon: iam la spesmilon kaj nun la stelon. La moneroj estas simbolo de la viveco de Esperanto. Aktuale estas uzataj plastaj stelo-moneroj dum junularaj Esperanto-kongresoj.

En 2026 aperis nova stelo-monero okaze de la 111a Universala Kongreso en Graco kaj omaĝe al la nederlandanino Julia Isbrücker kun nominala valoro 200 steloj, diametro 40 mm, maso 31 g, dikeco 3 mm.

Sur la averso videblas en la mezo „200 STELOJ 2026". Supre legeblas „ESPERANTO". Sube „111-A UNIVERSALA KONGRESO GRAZ" kaj „UNU UNCO DA LATUNO KUPRO 63 ZINKO 37".

Sur la reverso estas portreto de Julia Isbrücker kaj „1887–1971". La eldonkvanto estas 350. La materialo estas latuno, kiu konsistas el 63 % da kupro kaj 37 % da zinko.

La novan moneron produktis la firmao *Pichl* en Tirolo, Aŭstrio. Prezo: 18 eŭroj plus sendokostoj. Por mendoj skribu al Walter Klag, Vieno. Rete: *esperanto@chello.at*.






OSCANINO







ESPERANTO

## Unua IEspA-Volontula-Tago (IVT) en Diest (Belgio)

La volontuloj, kiuj dum la du pasintaj jaroj diversmaniere kunlaboris por instali kaj ordigi aŭ finance subteni la arkivejon kaj la arkivaĵojn de la Internacia Esperanto-Arkivo en Diest, je la unua de majo (Festotago de la Laboro!) ricevis de nia kunadministranto Roland Rotsaert en la nomo de la kompleta administrantaro invitilon por tiurilate kune festi surloke en la arkivejo kaj en la urbo Diest mem. La festo okazis sabaton posttagmeze, la 13an de majo 2026.

Preskaŭ dudek gastoj pozitive reagis je la invito kaj, ĉar multaj el ili jam bon(eg)e konis unu la alian, la etoso spontane kreskiĝis dum ili babilante ĝuis la delikatajn aperitivojn.

Komence,en la arkivejo, nia administranto Marc Vanden Bempt gvidis la gastojn tra la signalizigita "labirinto" de la kela etaĝo, por malkovri la tre fakule ordigitajn librojn, revuojn.



La kulminon, el turisma vidpunkto, oni povis travivi dank'al aktora paro, vestita laŭ la 19- jarcenta stilo, kiuj gvidis la grupon tra la stratoj kaj "mezepokaj" stratetoj de la urbo Diest. La aktoro, kromnomata "La Noktogardisto" kaj lia edzino, ne nur gvidis nin per seriozaj historiaj faktoj kaj eĉ malseriozaj anekdotoj, sed samtempe ili rolis, kiel spertaj aktoroj, kaj regule kun konsento de la publiko reciproke pafis geedzajn spritaĵojn. Alia kulmino de la gvidado estis la adiaŭa donaceto de la gvidintoj per gustumado de loka, tre bongusta pira brando.

Post tiu historia promenado atendis "hejme" la vespermanĝo, abunda kaj apetitiga dank'al la bonege aranĝita preparado de niaj Magda kaj Marc. Poste la samideanoj amike interparoladis ĝis la adiaŭaj salutoj ĝisrevidaj…

Tio estis tute sendube ripetinda iniciativo. Do, sincerajn gratulojn al la gastigantoj de neforgesebla evento en la  juna historio de IEspA…

Bert

**IEspA celas malfermi dokumentojn kaj objektojn en kaj rilate al Esperanto al esplorantoj, nun kaj future. Ĝi volonte akceptos esti sekura konservejo ankaŭ por viaj personaj Esperanto-dokumentoj kaj -aĵoj. Nepre vizitu la retejon iespa.eu**

Marc Vanden Bempt

## Varbilo por ENA!

Karaj membroj!

Bonvolu fojfoje dissendi la suban tekston al plejeble multaj gesamideanoj, kies retadreson vi konas. Nur tiel la nombro de ENA-anoj povos daŭre kreski. Via subteno estas bezonata! Ni anticipe dankegas vin!

Bert

---

Kara samidean(in)o,

Pro la ĝis tiam kompleta manko de tia projekto, en 2013 estis fondita la probable ununura fakgrupo "Esperanto-Numismatika Asocio" (ENA) kun revuo "Esperanta Numismatiko" en la historio de Esperanto.

La instiga kialo estis la konstato, ke en Esperantujo la propra trezoro je moneroj kaj medaloj estis apenaŭ konata, eĉ ne en la vasta rondo de kolektantoj. Kaj tiuj, kiuj scias, ke vere ekzistas tiaj belaĵoj, supozas, ke ili estas kvante kaj kvalite tute malgravaj. Tial, unu el la ĉefaj celoj de la nova fakgrupo estas montri al la esperantistoj kaj al la cetera mondo, ke esperantaj numismatikaĵoj estas kolektindaj kaj nepre pristudendaj artefaktoj. Kroma celo estas plejeble baldaŭ kompili kaj eldoni katalogon kaj enciklopedian terminaron.
La membro-kvanto de ENA kreskis dum iom pli ol dek jaroj ĝis 172 individuaj membroj kaj 25 esperantaj (kaj eĉ neesperantaj!) organizaĵoj, bibliotekoj, muzeoj kaj universitatoj, dise en la mondo.

Agrable kaj demokrate estas sendube, ke la asocio ne havas estraron, do ankaŭ ne kasiston!

Tial oni rajtas SENPAGE aliĝi (sufiĉas respondi: "Mi konsentas aliĝi"). Krome la NUR PERRETA revuo estas ankaŭ tute SENKOSTA! Kaj tio neniam ŝanĝiĝos!

Post aliĝo, ni klarigos kiel vi povas (ne devas!) elŝuti la jam aperintajn numerojn. SENPETE sekve vi ricevos ĉiujn novajn aperontajn numerojn. (4 n-rojnjare).

### Vi krome rajtas unue peti provnumeron!

Kun numismataj kaj samideanaj salutoj,

Bert Boon
Iniciatoro de ENA, ĉefredaktoro de "Esperanta Numismatiko"
bert.boon@skynet.be